



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 139 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. FEBRUARO, 1932.

"THE LIFE OF ZAMENHOF."

Translated from the original Esperanto of Dr. Edmond Privat by Ralph Eliott.

Published by Messrs. Allen and Unwin, London.

123 pages. Price 4/6, post 6d.

There are those in Australia and New Zealand who have clasped the hand of the modest little Polish oculist; of every civilised country the same can be said. This fact, inapplicable to many a louder name, is but one of many rays emanating from the universal character of the man and his work. Every Esperantist worth the name is at least fairly familiar with the life and labor of this unique figure. The same is, we regret, not true of the general public. The circumscribed meeting hall, the monthly broadcast, the occasional gazette article have not been enough to effect this enlightenment. The Book, the permanent record, was needed to fittingly carry abroad the message of deliverance from Babel's curse. This need has been met for the English-speaking world by Messrs. Allen and Unwin, who we believe to be the first house to issue the "Life of Zamenhof" in a national language, an act of enterprise that has, for once, shown the way to Continental publishers.

Of Lazarus Ludovic Zamenhof it has been said that his mother's heart, his father's brain, and the environment of a Polish village torn by racial hatred went to his making. It would seem that, in the order of things, such a man must needs have been called forth, for his life span covered the decades marked by the introduction of those technical conquests that were to usher in our present International Age.

And the flower of his genius, the language Esperanto, bids fair to become the cardinal factor in the cultural welding of the world's peoples.

It is difficult for the reader sensitive to the beauty of heroic struggle to voice the lines of this book without betraying certain emotion. The naive longing of the child Zamenhof for a better world; the lonely anguish of his student years; the recompense of joy at the prospect of victory heralded by the Boulogne Congress in 1905; the years of application that gave to posterity masterly translations from a dozen tongues; then the seeming annihilation of all idealism when the world caught fire in '14, and the final folding of tired hands in Warsaw, 1917—these pulsating pages were penned by one who shared intimately the hopes and disappointments of "La Majstro," by one who, by virtue of his eloquence in the interlanguage, has been named the Demosthenes of the movement.

The translator has finely succeeded in conveying to the English reader the accurate sense and rich coloring of the original; rare indeed are the slight evidences of the prism through which they passed. We confidently urge every Esperantist adept and sympathiser to help to the utmost in giving to this "Life" the scope of usefulness it deserves.

PUBLIKA LETERO

pri la reorganizado: Memorando al la Esperantistaro kaj ĝiaj gvidantoj, de Julio Baghy. 23-paĝa broŝuro. Eldono de Hungarlanda Esp. Societo, BUDAPEST, VIII, Dohany-utca 76. Prezo: 1 poŝta resp. k.

Watch this Space for a Special Announcement next month.

SYDNEY ACTIVITY.

The Sydney Esperanto Society, whose chief meeting place is in Manning Buildings, 449 Pitt Street (opposite The Hotel Sydney), has just opened a School of Esperanto in Paton's Buildings, No. 2, Crystal Street (corner of Parramatta Road), Petersham, N.S.W.

It was intended to hold the classes on Monday evenings only, but, through judicious advertisement in the local newspaper, and by personal canvass during a few weeks, news of the venture has become so widely known, and the response so encouraging, that the organiser has decided to institute a ambitious course of subjects as follows:

Beginners' Circle, Mon., 7.30 p.m.
Advanced Circle, Mon., 8.30 p.m.
Special Circle, Mon., 9.30 p.m.
Commercial Circle, Tues., 7.30 p.m.
Teachers' Circle, Tues., 8.30 p.m.
Linguaphone Circle, Tues., 9.30 p.m.
Religious Circle, Wed., 7.30 p.m.
Debating Circle, Wed., 8.30 p.m.
Geography Circle, Wed., 9.30 p.m.
Science Circle, Sat., 7.30 p.m.
Legal Circle, Sat., 8.30 p.m.
Travel Talk Circle, Sat., 9.30 p.m.

There will be four sessions each year, each session consisting of 13 lessons, each lesson of one hour's duration.

The first session commenced on January 11th. Already there are sufficient entrants to form three circles, each of ten pupils, and others are being enrolled.

Also, it is being made possible to inaugurate day classes for school children, as several parents have expressed the desire to have their little ones instructed in Esperanto.

Mr. A. W. Peacock, a native of Colac (Victoria), who studied Esperanto in Japan 26 years ago, and who was residing in that country during the Russo-Japanese War, and for several years after it (1904-1909), was engaged in the study of the Japanese language when Esperanto was first introduced into that country. The whole class immediately took it up with enthusiasm, each pupil purchasing for himself a Dictionary of English-Esperanto, by J. C. O'Connor, and an "Esperanto" Handbook, by the same author. Rapid progress was made by the use of these

two books, but they were handicapped through having no one who could correct them in the matter of pronunciation.

However, the Japanese people quickly realised the great advantages to be derived by them from its use, and applied themselves diligently in studying it. This is confirmed in "La Suda Krucio" of November, 1931 (page 310), under the heading "Esperanto on the March" (paragraph 2).

Mr. Peacock, the organiser, is voluntarily devoting his energies to this experimental tuition, and no effort is being spared to make the venture a success. This gentleman is a linguist of no mean order, and has spent nearly ten years in close contact with the peoples of India, Malaya, China and Japan.

He is also a good Latin and French scholar, and, through constant and diligent lingual studies, has acquired a wealth of knowledge of other important European languages. He believes wholeheartedly that Esperanto is the only hope of world-amity, and is an ardent preacher of its wonderful merits and possibilities.

Unfortunately, Australia is so far away from the hub of commerce that its people fail to realise the utility of such a powerful factor at their very hands.

There are however, many indications that the aloofness hitherto in evidence concerning Esperanto is fast dying away. A few ardent spirits constantly at work in the various trade centres will do much to bring to the minds of Australians a realisation that, while they are sleeping, the world is seizing upon Esperanto as the sole solution to many a difficulty that hitherto only war has been called on to decide.

From time to time this paper will be advised as to the progress of this experimental undertaking, the success of which, it is hoped, will be the forerunner of a revived interest in our wonderful and efficient auxiliary tongue.

RAPORTO DE LA KURSESTRO.

Petersham-filio de la Sydney Esperanto Society.—La 9an de januaro akurate je la oka horo la Sekretario de SES (s-ro L. E. Pfahl) venis en la

Watch this Space for a Special Announcement next month.

ĉambron por fari la inaŭguracian ceremonion vice de s-ro E. A. Pryke, kiu estas bedaŭre malsana.

La grupo en la kunvenejo inkluzivis kelkajn negocistojn; ĉi-kiuj forte interesiĝis je nia movado. Ili sentis surprizon pro la rapida progreso kaj la granda pensemeco de la loka organizanto, kiu tute respondicis pri la afero.

Dum la kunveno kelke da personoj varbiĝis por la kursoj; ili pagis la kotizojn, aĉetis lernlibrojn kaj verdajn stelojn. Ĝis nun ĉirkaŭ 35 homoj jam enregistris sin, ankoraŭ pliajn ni atendas.

La kunveno finiĝis je la 11a15 vespere, kaj eĉ tiam kelkaj ŝajnis ne voli foriri hejmen.

Pri la sabatvespera kunveno jam sufiĉe! Jen iom pri la unua kurso de la instruado la sekvantan lundon. Dek tri personoj ĉeestis. Oni uzis la nigran tabulon kaj penis interese teni la atenton. Kiam la leciono finiĝis neniu kursano deziris foriri, sed prefere restadis babilante inter si dum ankoraŭ unu horo.

Mardvespere kelke el tiuj lernantoj venis por plua leciono, kiun mi donis. Merkredvespere mi donis al aliaj leglecionon el la Nova Testamento, "La Preĝo de la Sinjoro," klarigante al ili vorton post vorto dum tre plaĉa horo. Ili deziris, ke mi klarigu al ili en la venonta merkredo "La Predikon sur la Monto."

Ŝajnas al mi, ke la entrepreno bone progresas kaj ke ĝi donos al la movado ĉitiumrba konsiderindan antaŭpuŝon.

Saluton de via sincere,

A. W. Peacock.

• ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned:—

That Viroflay (France) also has a "rue Zamenhof."

That the famous Japanese aviator Kato Masami has compiled a technical dictionary in Esperanto. He was recently appointed commander of the important 'drome at Dairen.

That the State of Lichtenstein has again issued a set of official post cards with views and explanatory text in German and Esperanto.

That the association for the blind, "Valentin Haüy" (France) has undertaken the printing in Braille of a French-

Esperanto dictionary.

That "The City Literary Institute," the most important body of its kind in London, has arranged a course of lectures on Esperanto literature. There are to be 36 lectures of two hours' duration each. Some 120 students attend the Institute's Esperanto classes.

That Count Kalocsay is translating the whole of Dante's *Inferno* for "Rivista Italiana di Esperanto." The first "kanto" appeared in the October number. Address: Via Goffredo Casalis N25, Torino, Italy.

That Seattle (KJRK) U.S. radio transmits at wavelength 970 metres Esp-o course and chronicle every Saturday; Huizen (Holland) on 1,875 metres an Esp-o course every Saturday; Osaka (JOBK) transmits **every day** in Esperanto (except Sunday).

That there were 12,667 transmissions on and in Esperanto from the world's radio stations in 1930.

That the Greek Ministry of Education has again willingly issued a decree favoring the instruction of Esperanto in schools and colleges.

That again the "Istituto Fascista di Cultura" in Brescia, Italy, has included Esperanto in its language program for the year.

50,000 PESETAS

for Spanish Esperanto Institute.

Senor Domingo, Spain's minister of education, has decided that the budget shall include the sum of 50,000 pesetas (£2,100) as a subvention to the Spanish Esperanto Institute for the establishment of chairs of Esperanto. With this money the S.E.I. will found free chairs in 13 towns. The institute will also set apart good prizes for the two best scholars in each town at the end of the courses, which will run from January to June, the only condition being that the candidates attend the Paris Congress of Esperanto in August next.

—Heroldo de Esperanto.

[Senor Rosenorn, president of the Spanish Esperanto Association, urges Esperantists to inundate, if possible, the office of the Minister with cards of approval, and to send to him gazettes printing this report. He says that on

Watch this Space for a Special Announcement next month.

such action possibly depends official introduction of the auxiliary language. The question is almost certain to be considered when the Government has mastered the initial difficulties of transition. Address: Senor J. M. Rose-norn, Sagasta 10, Madrid, Spain.]

"WANPAOSHAN INCIDENT AND ANTI-CHINESE RIOTS IN KOREA."

Detailed account of the above from the Chinese viewpoint. Sixty photo-illustrations, good paper and get-up. Conscious of the Englishman's profound ignorance of the Chinese language, it is in no spirit of captiousness that we give herewith a sample of the author's delightful style. "A whizzing bamboo pole was thrown out by one of his followers (read "pursuers") and unmissingly hit upon his head." Write to International Relations Committee, 5 Maotah-str., Nanking, China, in English or Esperanto.

'SEQUEL.

The director of the Hague Telephone Administration has been impressed by the large number of cards and letters he received from foreign and Dutch Esperantists approving his introduction of Esperanto into Spain into the service. He expresses his hearty thanks. (See page 324).

—Heroldo de Esperanto.

NEKROLOGO. S-ro W. Cornish.

La 28an de Septembro, 1931, mortis en Wellington, N.Z., ankoraŭ unu el la Nov-Zelandaj pioniroj de Esperanto, s-ro Vilhelmo Cornish, je la aĝo de 66 jaroj.

Dum pli ol 25 jaroj s-ro Cornish tenis grandan intereson en Esperanto. Li estis unu el la fondintoj de la antaŭa Esperanto Klubo ĉe Wellington kaj trapasis B.E.A. ekzamenon en 1909 gvidis klason dum la jaroj 1910 kaj 1911, instruanta multajn lernantojn.

Nov-Zelandanoj danke memoros tiun fidelan amikon kaj pioniron; kaj esprimas al la familianoj respektplenajn kondolencojn.

VOĈO EL INTERNOLANDO.

El Kvinslando venis interesa letero, el kiu ni donas ekstrakton.

"Mi ne povis ne rideti, legante vian konsilon aĉeti respondkuponon ĉe la poŝtoŝeĉjo. La plej apuda al mi p.o. estas for 20 mejloj. Ĝi estas etaĉa kabano ĉe soleca fervoja flankiĝo, kaj tial ĉar la poŝtisto liveras al mi la sendaĵojn unufoje en ĉiu semajno, mi tre malofte vizitas ĝin. Mia lasta iro tien estis antaŭ pli ol 12 monatoj. Mi tre tre dubas, ĉu respondkuponoj estas haveblaj tie, ĉar mi sensukcese petis ilin ĉe okulvide mirrapita oficeisto en la Hughenden'a oficejo, kiu situas 200 mejlojn for de mi. La plej proksima urbo stokanta poŝtkartojn kaj ĵurnalojn estas preskaŭ 400 mejlojn for! Kia terura malfacilo por homo, kiel mi, dezirema kontakti kun alilandanoj kun celo interŝanĝi p. markojn, p. kartojn kaj gazetojn. Mi devas do kontentigi je nura intersendo de leteroj, ĝis kiam mi trovos min en pli oportuna situacio."

"LA SOCIETO DE AMIKOJ (Kvakeroj) KAJ ĜIAJ ESENCIAJ TRAJTOJ."

20 paĝoj. Prezo 3½ p. ĉe Friends' Service Council, Friends' House, Euston Rd., London, NW1.

Bona Esperanta traduko de prelego de Edward Grubb, M.A., pri la principoj de sekto, kies kredo, rimarkinda fandaĵo de mistika kaj praktika Di-adoro, regas la vivon de 120.000 homoj en Usono kaj Kanado, 20.000 en Anglujo, kaj 2.000 en Irlando. Temas pri ilia centra doktrino, nome la Interna Lumo, organizo, sinteno al la Biblio, milito kaj sklaveco. Interese estas, ke la kvakeroj kiel unuaj "starigis la kutimon meti definitivan prezon sur vendotaj varoj en butikoj"; ke ili ankaŭ "havas la honoron esti la unua kristanaro en Usono, kiu decidis, ke sklavposedanto ne povas esti membro."

F. W. Mischke, Radeberg i.Sa., Germanlando, volas bonajn E. tradukojn el negermanaj gazetoj pri la germana politiko, Bruning kaj Hitler. Rekom-pencos per il. gaz., p. kartoj kaj p. markoj.

Watch this Space for a Special Announcement next month.

PARALLEL TRANSLATION

EVENING PRAYER. (Robert Louis Stevenson)

We come to Thee, O Lord, in the end of Thy day, with thanksgiving. Our beloved in the far parts of the earth, those who are now beginning the labors of the day what time we end them, and those with whom the sun now stands at the point of noon, bless, help, console and prosper them.

Our guard is relieved, the service of the day is o'er, and the hour come to rest. We resign into Thy hands our sleeping bodies, our cold hearths, and open doors. Give us to awake with smiles, give us to labor smiling. As the sun returns in the east, so let our patience be renewed with dawn; as the sun lightens the world, so let our loving kindness make bright this house of our habitation.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following. We regret to say, however, that this issue has not gone out under its own steam. Lapsed readers are earnestly asked to respond to our necessity by renewing their subscriptions as soon as possible.

Mr. Rawson, 4/-; Mr. P. Paris, 4/9, dec., '32; Mrs. A. Chapman-Taylor, 5/-, jan., '33; Mr. J. Rogers, 4/6, junio, '32; Miss Trundle, 5/-, nov., '32; Mr. H. McKerrow, 4/6, jan., '33; Mr. Dandridge, 2/6, junio, '32; Mr. L. Hiob, 5/-, majo, '33; Mr. Alexander N., 4/6, jan., '33.—Total £1/19/9.

[Lastmomente. Pro monmanko neapero de marta numero grave minacas. Helpu tuj!]

KION VI SCIAS?

- (1) Kie estas la statuo de libereco, kaj pro kio oni ĝin konstruis?
- (2) Kiuj eŭropanoj kiel unuaj ekvidis la aŭstralian marbordon?
- (3) Kiu estas la plejalta monto en Aŭstralio? En ŝtato Viktorio?
- (4) Kiu estis la unua gubernatoro de ŝtato Viktorio?
- (5) Kiu estas la plej pluva regiono de Aŭstralio?
- (6) Kial oni ne povas geedziĝi post la tria posttagmezo en Anglujo?

VESPERA PREGO.

Kun dankemo ni venas antaŭ Vin, ho Sinjoro, je la fino de Via tago. Helpu, konsolu, kaj prosperigu al niaj amatoj en la malproksimaj partoj de la tero, al tiuj, kiuj jam komencas la laborojn de la tago dum ke ni finas ilin; al tiuj, kun kiuj la suno nun staras ĉe la tagmeza punkto.

Nia deĵoro estas jam deŝanĝita, la servo de la tago finita, kaj la ripozhoro venis. Al Viaj manoj ni fide donas nian dormantan korpon, nian malvarmiĝintan fajrujon, kaj sendependan pardonon. Donu, ke ni vekigu kun ĝoja vizaĝesprimo, kaj iru al laboro ridetante. Kiel la suno reaperadas en la oriento, tiel ankaŭ nia pacienco refortiĝu kun ĉiu mateniĝo; kiel la suno lumas al la mondo, tiel ankaŭ donu, ke nia fratameco lumu al ĉi tiu loko de nia loĝado.

TERURA FUSO!

La jeno klare montras la necesecon de klara komerca lingvo. En franc-lingva gvidlibro tra Budapeŝto oni povas legi: „J'ai trouvé, que nulle part on ne danse mieux qu'ici, dans des salles de danse luxurieuses“; kio signifas: „Mi trovis, ke nenie oni dancas pli bone ol tie en la dancĉambroj malĉastegaj.“ Oni intencis diri „luxuriantes“ t.e. luksaj laŭ aranĝo, kaj diris malĝuste „luxurieuses“, vorto devenanta de „luxure“ (malĉastegeco). Bona reklamo por uzo de nacia lingvo en internaciaj rilatoj, ĉu ne?

(El La Komercio, bulteno de Komercesta Esperanto-Unio, Friedrich-Auguststr. 4, Radebeul, Dresden.)

[Laŭlitera cito. Ankaŭ la korekto povas esti diskuton pri ĝia ĝusteco, ĉar supozinde franco uzus „luxueuses“, „de luxe“ aŭ „somptrueuses.“ Grosjean-Maupin en sia Vortaro donas „malĉaste-ma“ kiel difino de „luxurieux.“—Red.]

ADVERTISEMENTS.

Would readers, when ordering goods from any of our advertisers, kindly mention "La Suda Kruco."

Watch this Space for a Special Announcement next month.

"STREĈITA KORDO"
Poemoj de K. Kalocsay.

Eldonita de Literatura Mondo, Buda-
pest, havebla ĉe B.E.A., prezo 4ŝ.

En 1924 falis el plumo de nia ĉefĉizi-
sto de versoj la jenaj linioj banitaj de la
larmoj de momenta sed amarega ĉag-
reno:

"Poeto sen popolo, ho animprema
scio,

Ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko...
Forsonas senresone la plora melodio,
Kiel ŝirita kordo en forlasita loko.

Ĉu plu projekti, fidi kaj revii mal-
grandknabe,

Kaj meti mozaikon el la lingveroj
splitaj,

Aŭ ĵeti for el mano la plumon, kiel
Kabe,

Kaj eksilenti—patro de versoj abor-
titaj?"

Nur en la lasta strofo de la poemo
"En Amará Horo" montriĝas denove
la brave fortika spirito de l'vera de-
diĉinto al purnobla ideo, la nevenkebla
persisto en nerekompencata laboro,
spite al indiferento, neŝato.

Sendube estas, ke ankoraŭ relative
malmultaj volas strebi al tiu pensega-
leco necesa por plena ĝuo de tio, kion
fabrikas la teksanta cerbo-koro de
homoj, kia ĉi tiu hungara majstro.
Malgraŭ tiu fakto ni kredas, ke la pol-
voŝuta mano de l'malatesto ne por
ĉiam kovros mortotuke la volumojn en
kiujn li sternis, per gemriĉa lingvo, la
plej ardaĵojn movojn de sia sopiranta
koro. Esperanto estas ankoraŭ por la
plimulto ĉe stadio elementafera, "prak-
tika," sed eĉ nun ĝi enpenetras tien,
kie estontece la verkoj de niaj verstalen-
tuloj ricevos analizan studon; ĝi en-
marŝas la liceojn, la universitatojn—la
hejmojn de homoj povaj ŝati la arton
de beleŝprimo.

Jen 190-paĝa kolekto, en kiu trovi-
ĝas inter aliaj la fama "Kongresa
Runo," peco aliteracia laŭ antikva
skandinava modelo; "Patrineco," kor-
funde simpatia paĝo el virina vivo—la
naiva emocio ĉe enamiĝo, la naskdolora
lukto, la laca feliĉo de l'jusa patrino;
"Grabowski mortis," adortributo de
unu granda poeto al alia; "La Renkon-
to de Kantoj," en kiu li ĉarme priuŝas
la rasan parencecon de finnoj kaj hun-
garoj; la pli longaj pecoj, "Maja Idilio"
kaj "Ahasvero de Amo."

Paĝo 26, linio 4, mankas "la" antaŭ
"Kre'". 37, "legionoj," por rimi kun
"regionoj"; la ĝusta formo estas
"legioj." Sur p. 9 sin trovas "lamento
giganta trarungo la landon" (A. ring
through the land). Supoze, Kalocsay
volis skribi "trasonoru," sed pro rit-
migo devis rezigni la dusilaban radikon
kaj plilarĝsignifi "ring". Jen du
poetaĵoj "rimedoj" nepre diskutindaj.

"PRETER LA VIVO"

de J. Baghy.

Eldonita de Literatura Mondo; have-
bla ĉe B.E.A. prezo 2ŝ. 96 paĝoj.

Multon el la supredirito oni povus
ankaŭ diri pri la samnacia rivalo de
Kalocsay en la verskampe, Julio Baghy.
Sed ne ĉion. En la dua eldono de ĉi
libro troviĝas jen sprita humoro, jen
spirita, eĉ etika, ribelema, trajtoj ne tre
troveblaj en la alia verko. La sanga
teruro de la milito ensorbiĝis en Baghy
ĝis plena saturo; el li ĝi eksudas en la
paĝojn per kiuj li krias al sia mondo.
Sed feliĉe ankoraŭ floras en la koto de
l'prifrontaj memoroj la sana ridemo de
juna idealisto, de homa homo. Dum
"katenis lin sklave Siberio" li povis
verki la "Kanton de Vagabondo."
Korŝire li kantas, sciiginte en
militkaptiteco, ke "La Majstro mortis";
donas li "Sablerojn," el kiuj kelkaj es-
tas pli spritaj ol saĝaj; li vagas "En la
Tombejo," jen "En la Drinkejo," kiun
lastan oni jam metis sur gramofondis-
kon de H.M.V.; kompatan kripteton li
elpuŝas por la mizeruloj de l'ĉiurba
pavimo en "Preĝo sur la Strato." Ad-
mirigas la leganton la lertaj rimuzoj
kaj la riĉmedeco de lia metrika eks-
perimentado.

Tiuj aspirantaj plene posedi nian ling-
von ne povas preterlasi la plezurajn de-
von enfosi ĝis fundo ĉi tiujn minojn de
Esperanta belliteraturo.

(Robo.)

FOR 4/- A YEAR.

We remind those with foreign cor-
respondents that we mail "La Suda
Kruco" to any overseas address for the
concession sub. of 4/- a year. Make
your letters specially welcome by the
inclusion of our Australasian Esperanto
paper!

Watch this Space for a Special Announcement next month.

AŬSTRALIAJ KROKODILOJ

Efektiva minaco en la nordo.

Lastatempe ĉe Ingham (Kvinslando) krokodilo perforte ekprenis kvinjaran infanon el la brakoj de l'frato. Tio ankoraŭ fojon rimarkigas al oni, ke vere tiuj bestoj estas ĉiama danĝero en la nordaj riveroj de Aŭstralio. En 1924, ĉe Cardwell, krokodilo dante ekprenis fervojan laboriston naĝantan en la Five Mile Creek (Kvinmejl Rivereto). Oni fine trovis lian kadavron kaj mortpafis la saŭrion. Ĝi estis longa 13 futojn. En 1925 amaso da homoj rigardis de sur la bordoj de la rivero Katherine (Norda Teritorio) la ferocon de la krokodilo. Vetkursa ĉevalo nomita Komet estis trinkanta, kiam subite kaptis ĝin per la nazo granda krokodilo. La ĉevalo freneze batis la atakinton per la antaŭaj hufoj, sed ĉi tiu ankoraŭ firme ĝin tenis. La du baraktantoj venis ĝis la akvosupraĵo kelk-fojojn: finfine la ĉevalo, malgraŭ ĝisekstremaj tordegoj liberigi sin de la mortigaj dentoj, estis dronigita.

En Kvinslando kelkaj blankhomoj tiel perdis la vivon, sed plejofte la krokodiloj prefere atakas nur bestojn.

Sin trovas du specoj de tiu reptilio en Aŭstralio. La pligranda estas la Crocodilus Porosus, indiĝena ankaŭ en Hindujo kaj Suda Ĉinujo, tra la Malaja Insularo, la norda marbordo de Aŭstralio, ĝis Papuo kaj la Fiĝi-Insuloj. Tiuj frekventas la riverbuŝojn kaj, pli alte, eĉ dolĉakvajjn ŝanelojn de riveroj, kaj foje estas vidataj iom tre malproksime en la maro. Fosiliaj restaĵoj de la pli granda speco troviĝis apud Brisbanc kaj en la Darling-Downs.

La dolĉakva speco, Crocodilus Johnstoni, estas multe pli malgranda; ĝi atingas nur sep futan longon. Ĝi estas preskaŭ maldanĝera, manĝas ĉefe fiŝojn.

Estas konataj okazoj, kiam krokodiloj rampis longajn distancojn de unu

rivereto al alia. Ili demetas de po 20 ĝis 80 ovojn. Eĉ nune oni trovas dudekojn de krokodiloj en la rivero Flinders kaj aliaj riveroj enmarigantaj en la Golfon de Carpentaria, sed jam de kelk-jaroj ilia nombro malpliĝis en la kvinslandaj riveroj. Dum multe da jaroj la kriktoj apud la riveroj Ingham, Herbert kaj Seymour estis plenaj de tiu pesto.

Antaŭ ne longe, ĉe Cardwell, oni kaptis krokodilon longan je 24 futoj. Unu 32futlonga estis mortpafita ĉe l'rivero Pioneer en 1924. Ĉe Townsville oni ruzkaptis specimenon, kies mezuro estis 18 futoj laŭ longo kaj 9 futoj ĉirkaŭ la talio.

Malofte nun sin trovas krokodiloj sude de Townsville. Tiom pli mirige, kiam oni mortpafis tian en rivero Logan, inter Brisbano kaj la novsudkimruja ŝtatlimo.

La maljunaj krokodiloj, pro sia granda korpopezo, neofte iras malproksimen for de la akvorando, sed laŭscie la plijunaj povas foriri iom longan distancon al nigrulaj loksidoj, kaj tie kapti kaj treni al rivero hundojn aŭ infanojn.

La maljuna krokodilo prefere sin movas ruze al la bordo de rivero, kie trinkas ĉevaloj, bovoj, didelfoj aŭ aliaj bestoj. Svingante bate sian fortan voston, ĝi ŝovas la viktimon en la akvon, kaptas ĝin per la dentoj, kaj, droniginte ĝin, puŝas ĝin en la surfundan koton, antaŭ ol ĝin finfine manĝi.

Krokodiloj, similaj al tiuj frekventantaj la nordkvinslandajn riverojn, kuraĝis, en Nov-Gineo, ekkapti homojn el boatoj, kaj eĉ ataki boatojn, deŝirante pecojn. (el la angla tradukita.)

La Internacia Scienca Asocio ĵus publikigis la Sciencan Fundamenton.

Tiu 100-paĝa broŝuro enhavas tekston, kiu prezentas elementan resumon de la matematikaj, fizikaj kaj naturaj sciencoj, kun laŭalfabeta tabelo de la vortoj.

KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,
Samarai, PAPUA.

Mendu ĝin al s-ro Rousseau, 2 rue Alfred de Vigny, Bèconles-Bruyeres (Seine) France, sendante samtempe la prezon, t.e. I dolaron aŭ samvaloran sumon.

ALIEPOKA FRATO.

Miriga fakto ĵus trafis en mian konon, skribis kontribuanto al la Londona "Evening Standard." Antaŭ kelkaj tagoj viro 92-jaraĝa estis venigita kiel atestonto antaŭ Berlinan kortumon. Demandite pri sia familio, li respondis, ke li havas fraton, kiu mortis jam tre longan tempon. "Kiun jaron li mortis?" demandis la juĝisto. "En 1793j." venis la respondo. "En 1793j?" frapite ĉhis la juĝisto; "Nepre vi volas diri 1893, ĉu ne?" Sed la maljunulo rejesis, ke vera estas tio, kion li per dokumento tuj pruvis.

Lia patro, naskita en 1774, edziĝis kiam 19-jara. Lia unua infano, filo, naskiĝis en 1793, sed mortis post du semajnoj. La patro reedziĝis, estante 63-jara, tio estas, en 1837. Lia dua filo naskiĝis en 1838. Kiam do tiu ĉi aperis antaŭ la Berlina kortumo lia "pliĝa" frato jam kuŝis entombe pli ol 137 jarojn. Supozinde ĉi tio estas rekordo!

KION VI SCIAS? (respondoj)

- (1) Ĝi staras sur Bedloe's Island, en Nov-Jorka haveno; la franca nacio doracas la konstruon en 1885, por honori la centjaran datrevenon de l'America sendependiĝo.
- (2) Holandanoj, kiuj, en 1606, eniris la Golfon de Karpentaria sur ŝipo "Duyfken."
- (3) Mt. Kosciusko (7,336 futoj); Mt. Bogong (6,508 futoj).
- (4) Charles Joseph La Trobe.
- (5) Laŭ nuna scio, la nordorienta kvinslanda marbordo, inter Port Douglas kaj Cardwell.
- (6) Antaŭ jarcentoj estis tiom da drinkdiboĉo ĉe geedziĝoj, ke en 1753 estis starigita parlamenta leĝo, kiu devigis geedzontojn fari la celebbron antaŭ la tria horo. Tio estis pro la bedaŭrinda fakto, ke tre ofte post tiu horo la ĉefroluloj kaj iliaj amikoj estis tre ebriaj por konscii ion pri la soleno.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A. Skribu al Sekretariino.

Mastertor. (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikajojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.